

# La Espero

1975-1

Svenska Esperantotidningen

Fondita en 1913

## La 50-procenta regulo

Ĉiam pli ofte ankaŭ la funkciuloj de la Esperanto-movado konsciigas pri la fakto, ke ekzistas homoj, kiuj la Internacian Lingvon lernis sen la idealisma emo siaflanke plivastigi la popularecon de la lingvo. Kvankam kelkaj konservativuloj ankoraŭ preferas fermi la okulojn antaŭ tiu fenomeno, ĝia serioza prikonsidero en la cirkonstancoj de nia laboro devas influi ankaŭ niajn planojn. Se ekzistas homgrupoj lernintaj la Internacian Lingvon pro malsamaj motivoj, tiam ne konvenas daŭre resti kroĉita al la malnova koncepto pri la demando — kio estas "esperantisto". Male, nia progreso estas plifaciligata, se ni turnas nin kun diferencaj deziroj, al la du grupoj de la lernintoj de Esperanto. Prave ankaŭ la nova Laborplano de UEA, akceptita de la Komitato en Beograd en 1973, faras distingon inter la **agantoj** kaj **uzantoj**.

Dum la uzantoj nur iel apogas la laborojn por Esperanto, estas la agantoj tiuj, kiuj vere antaŭenigas la Internacian Lingvon, plenumante ĉiujn necesajn laborojn. Unuflanke, tio estas laboro en la Movado mem, ekz. kunordigi laborfortojn instigi, averti, kuraĝigi, konsili, helpi ktp. Sed tio estas kaj restas laboroj interne de la Movado. Estas tute kompreneble, ke niaj klopodoj ne povas direkti sin nur al la esperantistoj. Ni devas zorgi ankaŭ pri la dua flanko: la tuto de niaj agadoj devas konsisti el internaj taskoj kaj el laboroj direktitaj al la ekstermovada publiko. Konvinki neesperantistojn signifas aldoni novajn fortojn al niaj vicoj. El tio sekvas, ke post la disdivido de la esperantistoj en du grupojn, ankaŭ en la grupo de la **agantoj** necesas formi du subgrupojn: la internan kaj la eksteran.

Por ĉiu aktivulo en la nacilingva medio la diferencigo inter la du formoj de laborado estas tre facile farebla: Rilatoj interne de la Movado kompreneble okazas en la Internacia Lingvo, dum la klopodoj influi la ek-

(Daŭrigo paĝo 2)

## TILL KÖPENHAMN I SOMMAR



(Bildo: Revuo Esperanto)

Köpenhamn, Danmarks huvudstad och Nordens mest kontinentala storstad, är platsen för esperantisternas 60:e världskongress. De svenska esperantisterna har under senare år blivit bortskämda med resor till mer avlägsna länder — för inte så länge sedan var det kongress i Tokio och 1972 i Portland på USA:s västkust — och vi tycker kanske att Köpenhamn ligger för nära till. Där är vi kanske rätt ofta!

Men årets världskongress har säkert ändå mycket att ge de svenska esperantisterna. För det första har det internationella förbundet, UEA, fått en ny ledning. Inte var det kanske något fel på den gamla, men nya krafter i toppen leder alltid till nya idéer, och det sätter säkert också spår på själva kongressen.

För det andra är Köpenhamn en stad som har oerhört mycket att erbjuda — det är faktiskt mycket mer än Tivoli, Zoo och Nyhavn — och kongresserna brukar ge tillfälle till att lära känna andra sidor än man

vanligen får kontakt med.

För det tredje får man ju på denna världskongress som vanligt kontakt med en massa människor från olika håll av världen, och eftersom Sverige ligger så nära, kan man ju få tillfälle att visa dem något av sitt eget land.

Så vi tycker nog att fler svenska esperantister bör anmäla sig till världskongressen än de som hittills gjort det. Vill du resa längre bort kan du ju göra det före eller efter kongressveckan i Köpenhamn.

Kongressen blir förlagd till "Falkoner Centret" i kommunen Fredriksberg i Köpenhamn. Det är ett modernt utrustat komplex med en samlingshall med plats för över 2 000 personer och med flera intima smärur. Där finns också hotellet "3 Falke", restaurang, bank, resebyråer m.m. Flera utflykter arrangeras, däribland en till Skåne.

Anmä dig nu. Efter den sista mars blir det dyrare. Avgifter på annan plats i detta nummer.



stermovadan publikon kaj favorigi ĝin al Esperanto evidente devas okazi en la nacia lingvo. La vera aganto do devas aktivi en ambaŭ kampoj, aplikante ne nur la Internacian, sed ankaŭ sian nacian lingvon. Estas erare en sia aktiveco uzi nur Esperanton, ĉar tio signifas resti inter la lingvo-amikoj, kie ĉiu jam estas konvinkita.

Estas facile kontroli la plenumon de tiu postulo. Necesas nur rigardi en la personan, kluban aŭ asocian arkivon kaj eltrovi respondojn al jenaj demandoj: Ĉu inter la korespondaj troviĝas sufiĉe de la leteroj ankaŭ en la nacia lingvo? Ĉu inter la faritaj prelegoj troveblas almenaŭ kelkaj en la nacia lingvo aŭ temis nur pri klub-vesperaj paroladoj? Ĉu la publikigitaj artikoloj, broŝuroj kaj eventuale eĉ libroj estas nur esperantlingvaj aŭ ankaŭ en la nacia lingvo? Ĉu oni pri sia aktiveco informadis nur la Esperantan gazetaron aŭ oni pri siaj entreprenoj sciigis ankaŭ la nacilingvaj gazetaroj, radion kaj televidon? Ĉi tiuj demandoj estas nepraj por ĉiu aktivulo, klubo aŭ asocio, kaj nur se montriĝos, ke oni agas en ambaŭ lingvaj medioj — la internacia kaj la nacia — oni povas esti kontenta pri la laboro.

Ne eblas definitive rilatigi la ampleksojn de la laboroj en tiuj du branĉoj de la aktivado, sed ĉar temas pri du laborkampoj, altrudas sin egala disdivido: 50 % de la laboroj okazu en la Internacia Lingvo, kaj 50 % en la nacia lingvo, sed por Esperanto. Mi ŝatus nomi tion la **50-procenta regulo**. Aktivulo estu kontenta nur se li aŭ ŝi same intense laboras kaj verkas ankaŭ en sia nacia lingvo kiel li aŭ ŝi tiurilate agas en Esperanto. Estas ja sole la nacia lingvo tiu, kiu al la vasta publiko povas transporti la belajn ideojn pri la utilo kaj neceso de Esperanto. Tial argumentadi nacilingve signifas vere antaŭenpuŝi la Internacian Lingvon kaj kunhelpi pri ĝia fina sukceso. Nepre necesas eliri el la ŝatata rondo de la esperantistoj kaj meti sin en la stormojn de la batalkampoj por Esperanto, meze inter la nekredantojn, dubemulojn kaj atakantojn. Tie, sur tiu ekstermovada batalkampoj, falos la definitiva decido pri la Internacia Lingvo — jes aŭ ne. Pro tio, sole kiam ni en nia agado aplikos la 50-procentan regulon, nur tiam ni rajtos fieri pri niaj faritaĵoj.

**D-ro Werner Bormann**

(El Esperanto, organo de UEA)

## VENONTA NUMERO

Limdato por manuskriptoj:  
28 februaro.

## Redaktoro:

Kiel ni diris en nia redaktora artikolo en nro 4/1974 ni nur escepte informas pri kvereloj kaj malpacigoj, kiuj bedaŭrinde kelkfoje okazas inter la gvidantoj eĉ de la internacia esperantomovado.

Ĉar iuj sinceraj kaj fervore laborantaj samideanoj telefonis al ni, kaj demandis pri la vera signifo de la okazaĵoj en Hamburgo, kiam ŝanĝiĝis parte la estraro de UEA kaj oni elektis novan prezidanton, ni volas tamen denove tuŝi tiun aferon.

UEA estis dum multaj jaroj gvidata de forta personeco, kies organizan kapablon kaj eksterordinaran talenton neniu pridubas. Dinamikaj personoj ĝenerale renkontas kontraŭstaron, kaj tiu kontraŭstaro kreskas en la daŭro de la jaroj, ĉar tiaj personoj malofte posedas la kompromisan kapablon kaj respekton por aliaj opinioj, kiuj ankaŭ estas necesaj por sukcesa agado en organizado, kiu konsistas el homoj el malsamaj medioj kaj kun diversaj opinioj. Ili ŝajnas diktatorecaj kaj pli aŭ malpli frue alvenas la tempo, kiam ili devas foriri.

Guste tio okazis en UEA. En Hamburgo oni elektis novan prezidanton kaj parte novan estraron, sendube tute konforme al la opinioj de la plimulto de la membroj.

Post la kongreso oni de certaj flankoj klopodas nigri la novan estraron, aludante ke ĝi forlasos la vojon de neŭtraleco kaj ke la ŝanĝo okazis pro la politikaj aspiroj de la asocioj de kvar orienteŭropaj landoj. Tiuj akuzoj estas absurdaj! La nova prezidanto estas profesoro ĉe universitato en Usono, unu vicprezidanto estas altranga ŝtatoficisto en la Federacia Respubliko Germanujo, la dua vicprezidanto, profesoro Stop-Bowitz en Norvegujo, estas bone konata kaj alte respektata ankaŭ inter svedaj esperantistoj, la nova ĝenerala sekretario, s-ro Wensing, estas direktoro ĉe PHILIPS.

Se la nova estraro tamen forlasos la neŭtralecon, oni kompreneble devus forigi ĝin. UEA estas demokratia organizado kaj la estraro ne disponas pri ia "sekreta polico" nek pri aliaj rimedoj por silentigi opozicion.

En demokratia organizado la funkcioj ricevas siajn mandatojn de la membroj, por difinita periodo kaj sen la rajto ilin posedi pli longe ol deziras la membroj. Tio validas por UEA, kaj validas ankaŭ por la funkcioj de SEF, inkluzive la redaktoron de La Espero.

Por la estonteco de la esperantomovado estas ege grave, ke ni svedaj esperantistoj per ĉiuj eblaj rimedoj — antaŭ ĉio financaj — apogu la novan estraron de UEA!

## Post Kopenhago: Århus-Göteborg

Post la UNIVERSALA KONGRESO en Kopenhago okazos POSTKONGRESO en la dua urbo de Danlando, AARHUS, 3—6 aŭgusto 1975.

Konstanta adreso: Hørmøksallé 5, DK 8240 Risskov, Danlando. Kongres-ejo estos alternejo "Junaj Hejmoj" en Skåde apud Aarhus.

En kunlaboro kun la Turistoficejo de Aarhus la Postkongresa Komitato klopodas fari allogan programon.

Elstaras:

Urba rondveturado en Aarhus, interkona vespero, akcepto en la urbo-domo kaj du tuttagaj ekskursoj kiuj okazos samtempe. Unu al la mezjullanda regiono ĉirkaŭ la "Ĉielmonto", Himmelbjerget, kaj la urbo Silkeborg, kiuj situas meze inter lagoj kaj arbaroj. Kaj alia al Okcidentjullando kaj la Norda Maro.

La danaj ŝtatfervojoj disponigos specialan trajnon de Kopenhago al Aarhus je tre favora prezo se anoncos sin minimume 150 personoj antaŭ la fino de la 60-a en Kopenhago (prefere pli frue).

Petu aliĝilon kaj la esp-lingvan turistbroŝuron pri Aarhus kiu baldaŭ aperos en la 4-a eldono.

Precize en la momento de presigo de tiu ĉi numero alvenis informo ke la ĝemelaj urboj Århus kaj Göteborg kunlaboros pri postkongresaj aranĝoj, tiel ke Göteborg aranĝos postkongreson post la fino de tiu en Århus, t. e. 6—9 aŭgusto. Komuna vojaĝo per ŝipo de Århus al Göteborg. Estos eble aliĝi al ambaŭ aranĝoj samtempe. Pliaj informoj sekvos.

### LA 10-A ORA POLA AŬTUNO

Okazis la 5—18 de septembro en vera somera vetero. Miedzygorze kio signifas en loka lingvo: Inter montoj, situas en la bela Klodsko-regiono. Partoprenis 377 personoj el 11 landoj. La malfermo okazis en moderna kinejo. Post bela prologo de Ursula Tupajka sekvis salutparoloj de polaj kaj eksterlandaj reprezentantoj. El la riĉa programo oni povis elekti: promenadojn en la montoj, lingvajn lecionojn, ekskursojn, koncertojn, filmojn, dancojn, k. t. p. La plej ŝatata programo estis certe la ĉifona balo, kiu donis multe da plezuro.

Dum granda solenaĵo la komunumo transdonis insulon troviĝanta en la rivero al la esperantomovado. Multaj personoj rigardis la solenan transdonon, kiu okazis je kantado de ĥoro, paroladoj, parado de skoltaj kiuj malkovris nigran memorŝtonon kun teksto en ambaŭ lingvoj. Pasis du agrablaj semajnoj en vera esperanta komuneco.

Karlo I-a



## Tejo kongresos en Fredericia

19.7—26.7 1975 okazos la 31-a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto en Fredericia en Danlando. Temo de la kongreso: Kultura interŝanĝo. Kotizoj ĝis la 31-a de marto: ĝis 19-jara 275 dkr, 20—24-jaraj 300 dkr, 25—29-jaraj 325 dkr, pli ol 30-jaraj 350 dkr.

Alĝa adreso: TEJO-Kongreso 1975, Thunögade 26-4, DK-8000 Århus, Danlando, ĝirokonto 26 62 67. Korespondadreso: Christian Lauritsen, Østergade 43, DK-7430 Ikast, Danlando.

## JARKUNVENO DE UNIVERSALA LIGO

La unua membrokunveno de la renoviĝinta U. L. okazis la 30.11.74 en Hotelo Bristol en Hago (Nederl.) en tre vigla sfero. Oni elektis laborestraron konsistantan el kvar personoj, nome: H. J. Hendriksen (prezidanto), Andreo Cseh (sekretario), F-ino A. van Well (2-a sekr.). C.M.N.T.Op't Roodt (kasisto).

UL laboras "Por mondpaco per Mondfederacio" kaj la oficiala lingvo de la Ligo estas Esperanto. Oni bonvenigas novajn membrojn. La jarkotizo estas laŭvola, sed minimume 10:— (dek) sv.kr. pageblaj al la Svedlanda poŝta ĝirkonto nro 745 75-1 Stockholm.

Efektivigu ĉiujn pagojn je la nomo: UNIVERSALA LIGO, Postbus 334, BUSSUM — 1351 NEDERLANDO.

T. M.

## PRI LA INTERNACIAJ FERIAJ KURSOJ DE HELSINGÖR

Post 43-jara aranĝado kaj gvidado de la internaciaj feriaj Esp-kursoj de Helsingör, ni sentis, ke nun venis la tempo por retiri nin de tiu laboro.

Tial ni transdonis la aranĝon al komitato de kelkaj anoj de la Esp-klubo de Helsingör kaj de la najbara klubo de Helsingborg.

La prezidanto de la komitato estas s-ro Gösta Persson, Helsingborg, la kasisto s-ino Inga Magnusson, Helsingborg, kaj la ĝenerala sekretario s-ino Eva Lankilde, Helsingör.

Ni sincere ĝojas, ke tiel fervoraj kaj lertaj samideanoj kiel ili transprenos la laboron.

Ĉiujn korespondadojn kaj petojn pri kursprogramo bonvolu sendi al

S-ino Eva Langkilde  
Ingemannsvej 18  
DK-3000 Helsingör, Danmark.

Ni ĉeestos ankoraŭ en la venonta somero en la libroservo de la kurssemaĵno.

C. & L. Friis

## UPPROP

Den svensk—esperantiska ordboken (Jansson-Lindén-Gerdman) är praktiskt taget slut på förlaget. Docent Ebbe Vilborg i Göteborg — den nya generationens främste svenskspråkige expert på esperanto — arbetar sedan flera år med manus för en ny svensk—esperantisk ordbok. Arbetet är nu i det närmaste slutfört.

Att ge ut en ordbok i våra dagar med ständigt stigande priser för papper och tryck kräver emellertid stora kostnader. Till skillnad från många andra esperantoutgåvor är ju dessutom köparkretsen begränsad till det svenska språkområdet. Priset per exemplar för den nya ordboken blir under sådana förhållanden orimligt högt.

Under årskongressen i Borlänge förra året diskuterades möjligheterna att ge ut den nya ordboken. Förlagets chef beräknade då att förlaget, för att ordboken skall kunna erbjudas till ett något så när acceptabelt pris, skulle behöva en subvention på ca 40.000 kronor. Det måste bli fråga om en ren gåva; en utfästelse på förhand om att köpa ett antal ex. av boken är i detta fall inte tillräcklig.

Styrelsen beslöt på kongressens inrådan att tillsätta en särskild kommitté (M. Andréasson, A. Blomberg, E. Carlén och F. Luin) som fick i uppdrag att undersöka möjligheterna att finansiera ordboken. Relan kongressen i Borlänge beslöt att man skulle vända sig till klubbar och enskilda esperantister med en vädjan till var och en att överlämna 1.000 kronor som gåva till den nya ordboken. Några personer anmälde sig på teckningslistor, som cirkulerade bland kongressdeltagarna.

I november förra året sammanträdde kommittén i Göteborg, varvid även Ebbe Vilborg och Oskar Svan-

tesson — den senare tekniskt intresserad av projektet — deltog och man diskuterade olika sätt att få fram erforderligt kapital. Kommittén är givetvis inte klar med sin uppgift ännu, men man beslöt att enligt kongressens beslut gå ut med ett upprop i La Espero.

Vi väddar alltså till klubbar och enskilda esperantister om bidrag, 1.000 kronor, till den nya ordboken. Att beloppet har satts så högt betyder naturligtvis inte, att vi säger nej till mindre (eller högre) gåvor. Men vi måste ha in 40.000 kronor, förmodligen mera eftersom kostnaderna ständigt ökar, och det räcker således inte med en vanlig insamling, som ger kanske 3.000—5.000 kronor. Flera personer kan kanske slå sig ihop om ett gemensamt bidrag, flera mindre klubbar kan göra likadant, och det är också möjligt att dela upp betalningarna i flera mindre poster under en längre period. Huvudsaken är att vi med gemensamma ansträngningar kan skaffa fram det kapital som behövs.

Som vi redan framhållit är svenskan ett relativt begränsat språkområde. Att i dessa dagar ge ut en esperantoordbok för enbart detta område är ett djärvt företag. Det vittnar om esperantorörelsens styrka att ett sådant projekt över huvud kan övervägas. Det är inte desto mindre utomordentligt viktigt för vår rörelses framtid att vi kan tillhandahålla kommande generationer en förstklassig ordbok. Vi väddar därför till alla och envar om stöd för projektet. Sänd dina bidrag till Svenska Esperantoförbundet, postgiro 2012-3, och glöm inte ange att beloppet avser gåva. Skriv "Por Vortaro" på talongen. Om du vill betala i delposter eller betala senare meddela förbundet (adress, se sista sidan).

### HELSINGÖR 1975

tuj antaŭ UK de Kopenhago

La internaciaj feriaj Esperanto-Kursoj okazos 20.—26. de julio en La Internacia Altlernejo de Helsingör. Ni invitas vin veni por ĉeesti — kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en internacia rondo dum la semajno tuj antaŭ la kongreso de Kopenhago.

Programo senpage havebla ĉe

Eva Langkilde  
Ingemannsvej 18  
DK-3000 Helsingör  
Danlando

### DU KAN

bli medlem av UEA.

### DU KAN INTE

undvara tidningen ESPERANTO och årsboken.

### JUST DU KAN

hjälp UEA ekonomiskt genom medlemskap.

Avgifter:


80 kr för årsbok och månadstidskriften ESPERANTO.

240 kr för stödjande medlem (se sep. artikel).



# En bela majo - Al ĉarma Halmstad

Jam en la lasta numero de 1974 ni prezentis la urbon Halmstad, ĉe la sudokcidenta marbordo de Svedujo, ĉefurbo de la provinco Halland, kie okazos dum la pentekosto (17.5—19.5 1975) la jarkongreso de la Sveda Esperanto-Federacio. La energia Loka Jarkongresa Komitato sendis al ni ankoraŭ kelkajn informojn pri la urbo kaj la aranĝoj. Ili ankaŭ sendis la kompletan provizoran programon. El tiu ni tamen ĉerpas nur kelkajn erojn, ĉar la kompleta programo aperos en la venonta numero.



## LA KONGRESEJO

En ekstreme vige kreskanta, tute nova urboparto, troviĝas **OK Motor-hotell**, kie okazos la kongreso kaj kie povos loĝi la kongresanoj. Estas la plej nova kaj moderna hotelo de nia urbo, sed la prezoj por la konferenco tamen estas sufiĉe favoraj.

Ĝi estas facile atingebla por tiuj, kiuj veturas per aŭtoj, kaj situas proksime de la kruciĝo inter la ĉefvojo E-6 kaj vojo 25.

Se vi alvenas vagonare ĝi estas atingebla per taksio je proksimume 15:— por unu persono, sed se vi informos pri alvenhoru eble la klubanoj povos renkonti vin kaj transporti.

## SENKOSTA LOĜEJO POR GEJUNULOJ

Ni provos aranĝi senkoston tranoktadon por gejunuloj. La Esperantista Klubo disponigos al ili sian klubejon por tiu celo, kaj NBV (Kleriga Asocio de la Abstinenca Movado) disponigos du — tri ĉambrojn por tranoktado. La kondiĉoj en ambaŭ okazoj estas matracoj plenegeblaj je aero kaj dormosakoj.

## DISERVO

okazos, laŭ ankoraŭ ne tute fiksitaj planoj, en nova preĝejo en la sama urboparto kie situas la kongresejo. Tiu preĝejo estas nun konstruata, sed laŭ la preposto kaj paroĥestro ĝi estos preta en bona tempo antaŭ la kongreso.

## VIDINDAĴOJ

Vidu la artikolon en la antaŭa numero. Tamen ankoraŭ kelkajn vidindaĵojn ni volas mencii:

Liberaera muzeo troviĝas sur la altaĵo Galgberget. Tie troviĝas i. a. la malnova biendomo Hallandsgården, ventomuelilo kaj la Lerneja domo de Edsberga. Tiu estas konstruita en la jaro 1843. Se ni ne eraras la leĝo pri deviga popollernejo devenas de la jaro 1842. Do, sufiĉe malnova lernejo, kiu pruvas, ke la scivolemo de la hallandanoj frue vekigis.

Brooktorpsgården estas malnova trabfaka domo en la centro de la urbo, kiun tiu, kiu deziras kamparanstilan ejon, povas ludi por festenoj.

## MULTFACETA NATURO

En la najbareco de la dense loĝata urbocentro sin etendas fekundaj ebenaĵoj. Kvankam la provinco Halland eble ne estas la plej fama agrikultura regiono, ĝi tamen havas raciajn terkulturadon, hovobredadon kaj lakto-produktadon.

Cetere la naturo de Halland tre varias de loko al loko, kaj ĝuste tial indas viziti tiun provincon.

Ankoraŭfoje ni revenos, informante pri la kongreso.

## EROJ EL LA PROVIZORA PROGRAMO

Pentekosta Vespero:

- 15.00 Malfermo de la kongresoficejo
- 17.00 Solena Malfermo
- 20.00 Bankedo

Pentekosta Tago:

- 09.00 Jarkunsido de SEF
- 14.00 Ekskurso per aŭtobusoj
- 16.00 Kafo en Tylöhus
- 18.00 Diservo. Paroĥestro Gunnar Edberg
- 19.30 Muziko k. t. p. Kunsido "La virino en la esperantista literaturo." Temanĝo.

Dua Pentekosta Tago:

- 09.00 Diskutado: "Kiel oni akiras membrojn kaj konservas ilin"
- 13.30 Fermo de la kongreso.

Venu unuope, duope aŭ amase, sed venu! Ĉiuj esperantistoj de Halland konvenigas vin, kaj la Esperantista Klubo de Halmstad denove salutas vin **KOREGAN BONVENON!**

## FLER MEDLEMMAR

till våra föreningar och därigenom till förbundet bör vi i år kunna åstadkomma. Börja med familjen, där Ni träffar sympatisörer både bland unga och gamla. Anmäl dessa som familjemedlemmar. Fortsätt sedan med vänner och bekanta. Att Ni även där träffar sympatisörer, som vill stödja vårt arbete genom medlemskap, är säkert. Inte alltid men många gånger kan medlemskap för dessa personer bli en inkörsport till E-kurs. Det visar erfarenheten. Vårt förbund får i varje fall ett värdefullt stöd.

## FYND!

Ett fåtal av den mycket omtyckta och lästa

**"La Ringo de la Generalo"**  
av Selma Legerlöf

finns ännu kvar. Säljes endast i enstaka exemplar.  
Passa på nu!

Pris med moms kr. 12:—

**FÖRLAGSFÖRENINGEN  
ESPERANTO**

Fack, 200 42 Malmö 7  
Postgirokonto 578-5



## Stokholma aŭtuno

Vi diris, ke tri monatoj ne sufiĉas por ekkoni iun, kaj ke vi ne konas vin mem... Plej ofte vi ŝprucis vivgajon ĉirkaŭ vi, iufoje estis melan- kolie malkontenta pri vi mem.

Sed ne serĉu ĉiam ekvilibron; la ĉiama ekvilibro ne troviĝas ĉe la homoj, ĉar ĝi mankas en iliaj animoj. Kelkaj sukcesas atingi ĝin pere de la religio, aliaj pere de l'arto kaj scienco, kiuj ebligas por tempeto akiri Harmonion.

Poste la senĉesaj movoj de l'mondo kaj animo rompas tiun harmonion, kaj la homo devas denove ascendi sian rokon. Ĉi ŝvebado ĉirkaŭ fiksa punkto — estas la Vivo. La konscio, ke ĉi punkto ekzistas, estas la Feliceo.

Estas tute same se oni dividas en momentojn la plej belan Amon: ĝi konsistas el sennombraj miskomprenoj, etaj konfliktoj, kiujn ĉiam forigas la Konfido.

Se oni dispartigas la feliĉon: ĝi konsistas el batalo kaj turmentoj, sed ĝin eterne konservas — la Espero. Ĝis kiam konfido kaj espero estos reciprokaj, daŭros ankaŭ nia Amikeco.

Nun vi verŝajne demandas: sed kio estas konfido? Mi mem ne scias klare. Por unuj estas nura kutimo, eĉ obstino. Por aliaj kolekto da belaj, helaj, semajnofinaj rememoroj kristaliĝintaj dum labortagoj: piedetoj promenantaj sur tapiŝo teksita de l'Aŭtuno el falinta foliaro ĉe Djurgården; solsola ruĝflava folio, kiu lastforte klopodas rezisti ventojn sur arbopinto; pluveroj kvazaŭ orelpandaj perloj tremantaj je arbobranĉaj ekstremoj sur lunluma vojo ĉe Ålsten; lumkopio de fenestro desegnita de la radioj de l'subiranta suno sur internan, malhelan murflankon en l'antikva kastelo de Uppsala, nebulo ĉe Tegelbacken, kiun subite trablondas kara kapeto; adventa kandelo ekbruligita de mallarĝa, gracia maneto por lumbrili tutjare en "hejmo" de solulo...

Jes, konfido solidigas la vivon kaj donacas al ĝi firman kaj rektlinian trajton. Ĝi spitas niajn ribelojn, forpelas nian timtremon, transformas nian malforton en forton. Konfido estas pli ol nura punkto apoga, ĝi estas nia konsolo.

Kaj la Espero? Mi apenaŭ povas tion klarigi al vi. Sed iru foje, vespere al la fenestro kaj malfermu ĝin larĝe. Profundigu viajn okuldiamantojn en la densan kaj silentan nokton poste direktu vian rigardon en la foran alton kaj lasu vian animon sekvi ĝin, kaj vi trovos ĝin:

La espero estas Stelo...

Io Iu

## Memore al Helsinki

*Sur duoninsulo  
ĉe la blua Finna Golfo  
sidas Vi  
la blankvestita belulino  
de la Nordo.*

*Jam demare mi,  
vidante Vin  
sentas emocion en la koro.  
La graciaj formoj Viaj  
ebruigas junigas,  
Via rideto ĉarma  
sune varma.*

*Tenere Vi etendas  
la molajn brakojn  
por bonvenigi min  
Vian amikon,  
kiu Vin admiras.*

JIM HORNO

Søndagen den 13 april äger skrivningar rum för

### EXAMEN I ESPERANTO

Anmälan: **Högre examen** till Ebbe Vilborg, Prästgårdsängen 2, 4 tr., 412 71 Göteborg, tel. 031-40 52 74.

**Lägre examen** till Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, 421 74 Västra Frölunda, 031-29 03 81.

Anmälningar senast den 31 mars 1975

SVENSKA  
ESPERANTO-INSTITUTET

### NOVA SERIO DA LIBROJ POR GEKNABOJ

**SAVO EL LA NEGO** de P. Korte

Facila libro por grandaj geknaboj. Streĉa enhavo pri travivaĵoj de junulo dum flugakcidento en la francaj alpoj kaj lia feliĉa savo. Bonaj desegnaĵoj sur ĉiu paĝo. Prezo kun moms 11: 25.

**LA MORSO — KLUBO** de R. Fisker

Sperta dana verkisto skribis tiun ĉi libron por mezgrandaj geknaboj pri kontakto pere de Morso inter du knaboj, kaj pri aventura okazintaĵo dum nokta signalado... La lastaj paĝoj de la eta libro enhavas alian interesan rakonton: "Trezoro-serĉado." Desegnaĵoj sur la paĝoj. Prezo kun moms 4: 55.

**ELSE KAJ BO** de R. Christophersen

Carma libro por malpli grandaj geknaboj, ankaŭ tiu ĉi kun tre allogaj ilustraĵoj — desegnaĵoj. Certe la rakonto pri la ĉiutaga vivo — vere enhavoriĉa en sia trankvileco — pri Else kaj Bo estos kara "bonan-nokton" — laŭtelegaĵo, se la infanoj ne mem ankoraŭ povas legi libreton. Prezo kun moms 5: 80.

Ciuj tri haveblaj ĉe

### ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Fack, 200 42 Malmö 7 - Poŝtĝrkonto 578-5  
SED MENDU EN BONA TEMPO!

## Du behövs i i UEA:s Societo Esperanto

Från och med år 1975 finns inom UEA medlemskategorin Societo Esperanto, som ersätter tidigare stödjande medlemsavgifter. Man betalar 240 sv. kronor — tre gånger ordinarie avgift — och kommer därmed att tillhöra en särskild grupp medlemmar, för vilka ordnas bl. a. särskilda mottagningar vid världskongresserna.

Avsikten är naturligtvis att de esperantister, som har råd att betala en högre avgift, får tillfälle att göra detta. Därmed vill man undvika en höjning av den ordinarie avgiften, som skulle slå mycket hårt för medlemmar i lägre inkomstklasser och i vissa länder.

Sverige hör till de länder, där just Societo Esperanto bör kunna ha ett antal medlemmar. Vill du göra en betydande insats för vår internationella organisation; betala 240 kr för Societo Esperanto! Du kanske tycker beloppet är högt. Tänk då på vad du ger ut för andra, kanske mindre betydelsefulla ting! **Vi vädjar till Sveriges esperantister att på detta sätt stödja UEA!** Har du redan betalt din ordinarie avgift men nu skulle vilja ansluta dig till Societo Esperanto, så går det säkert att ordna genom att du sänder ytterligare 160 kr till postgiro 14 74 29-5, Svenska Esperantoförbundet.



# Ni legis

**Verda Robo.** Johan Hammond Rosbach. 96 paĝoj. Dansk Esperanto Forlag. Prezo ĉe Esperantoförlaget, Malmö, 32:— sv. kr.

Tiu, kiu nur supraĵe trafoliomas tiun verkon eble demandas, ĉu ĝi vere prezentas ion interesan al moderna, postulema leganto. La stilo ja estas tre simpla kaj klara. Malofte la aŭtoro uzas komplikajn vortojn kaj neologismojn tute ne. Ideala legaĵo por nova, nesperta esperantisto...

Sed la scenejo kaj la homoj. En turista hotelo ie en Norvegujo kolektiĝas aro da homoj por mallonga somera restado. La plej multaj el ili estas maljunaj, havas siajn vivojn malantaŭ si, kaj la plej multaj apartenas al tio, kion ni en Svedujo nomas "socia grupo 1", al la vera supera klaso: fama politikisto, profesoroj, vidvino de generalo k. t. p. Ĉu tio estas io por la homoj de nia generacio, por nia gejunularo? Eĉ la intrigo — nek-nata ŝtelisto inter la hotelgastoj, kiu forŝtelas iliajn valoraĵojn el la ĉambroj — ŝajnas sufiĉe ordinara, eĉ naiva.

Sed la libro estas pli ol ĉio tio. Tion oni konstatas, kiam oni fermis la libron post la tralegado kaj trovas, ke tiuj figuroj onin ne forlasas. Ili aperas en la pensoj dum la taga laboro, dum solecaj promenoj, eĉ dum noktaj sonĝoj. Same kiel la figuroj de la verkoj de la grandaj aŭtoroj. Kaj tio okazas pro la majstra maniero en kiu Rosbach, per simplaj vortoj kaj sen granda dramatiko sukcesas bildigi la homojn. Tiuj homoj, je la fino de siaj vivoj, estas ĉiuj individuoj, kaj ĝuste ilia individueco aperas en la interparoloj kaj diskutoj. Kaj tiuj ecoj, tiuj problemoj, kiujn Rosbach tiel genie vivigas, ne apartenas al iu aparta epoko aŭ aparta aĝo, nek al iu difinita socia klaso. Ili estas ĝeneralaj, ili estas eterne homaj.

Tiu eta libro estas majstraĵo kaj oni povas ĝin nur forte rekomendi!

obo

**Kantu kun Ramona.** Dansk Esperantoförlag. Malgranda formato, 24 p. 3: 80 sv. kr.

La tekstoj de la kantoj de Ramona van Dalsem. Bonvena plinovigo de la esperanta kantararo. Konvena ankaŭ por studrondoj.

## NI RICEVIS

plurajn librojn kaj de Dansk Esperantoförlag kaj de la eldonejo Stafeto, kaj iom post iom aperos recenzoj. Kelkaj troviĝas jam ĉe la recenzistoj, kelkaj ankoraŭ restas ĉe la redaktoro atendante recenzadon, ĉar daŭre mankas al ni recenzistoj.

## Vortjonglajo

...KUN SIASPECA SPICO! Libro originale verkita en esperanto de Raymond Schwartz. Eldonis J. Ré-gulo, La Laguna, Tenerifo. Prezo ĉe Esperantoförlaget, Malmö: 28:80 sv. kr.

La 7-a volumo presita sub la marko STAFETO ampleksas pli ol 200 paĝojn plenŝtopitaj per prozaj kaj versaj humuraĵoj nove verkitaj. Al tio aldoniĝas la 20 kronikoj aperintaj en 'Sennacieca revuo' sub la rubriko **Laŭ mia ridpunkto**.

Same kiel ĉiu lingvo havas sian vortariston ĝi ankaŭ havas sian vortartiston, kiu en esperanto estas la vortartisto Raymond Schwartz. Li scias ne nur lerte-arte aliteracii sed povas el ordinara ĉiutaga vorto per silabdisigo aŭ literaladono krei tute novan enhavon al la plej triviala sentenco. Jen strofo kiu klarigas:

Okaze de dumbala puŝo  
li vidis ŝin kun pala buŝo  
kaj pensis: 'Dum la bansezono  
satiĝos ŝia sanbezono'

Pro manko de spaco la speco de spico donas nur palan rebrilon de la tuto. Vi tamen atentu la admonon rilate legadon de libro kun tiom da spico, kiom ĉi tiu regalas: Legu po-pece kaj via ĝuo daŭros dum multaj agrablaj vesperoj. Post la tralego vi eble estos en akordo kun la aŭtoro, kiu per sia XXIII-a Semaforismo aksiomas jene:

"Ĉiuj lingvoj estus multe pli facilaj, se ne ekzistus poetoj".

Sam

## GRAMATIKA RECENZO

14-paĝa, junaĝa biografio pri IU FINNA INFANAGO. Ses rakontoj en Esperanto. Verkis E Rasku.

Modele mallonga, verkita en trankvile flua maniero, taŭgas por 6 lecionoj de komencaj legemuloj. Temas pri junaĝo de knabeto, en kies urbaj bruforan silenton tamen penetras sangondoj de (interna?) milito.

Mi rekomendis ĝin por komencaj kursoj. Sed nepre "Cum grano salis" t.e. kun iom da salo = uzado de akraj okulvitroj gramatikaj. Vidu p. 5. Anstataŭ "entuziasme kun (?) ili okupiĝis mi uzus: "okupiĝis pri ili".

P. 6: Anst. "Li konsideris ilin nebezonatajn (?) mi uzus; senbezonaĵ (t.e. sen akuzativa "n"). — Anst. "Por ke neniu domaĝo okazus" devas esti: okazu (senkondiĉe sen kondiĉa "(u)s".

P. 7 "Poste ni sole (?) ofte revenis. Gusta formo: solaj (!).

P. 8: "Tenis lernejan korton kiel ordinara (?) manovrejo (?). Guste: kiel ordinaran manovrejon.

Verdula reformo lingva frapas la okulojn de zamenhofa fundamentano sur p.8 & 12. Anstataŭ "Estja" nepre: "Estas ja" (ev. "As ja" se vi audace provas novismon...) Anst. "Estjam!" nepre: Estas jam" (ev. audace — as jam.)

T. M.

## DU HAR RÅD...



bli direkt medlem av UEA.

## Brevmärken

SEF har fått en större mängd brevmärken som gåva. Emblemerna är detsamma som används för Semajno de internacia amikeco men dessa märken kan med fördel användas under hela året. Hela betalningen går oavkortad till den nya ordboken. Priset har därför satts relativt högt: 3:— kronor per karta. Rekvirera genom insättning av beloppet på postgiro 66 41 50-0, Svenska Esperantoförbundet, informationskonto. Skriv Brevmärken på talongen.

## La suda distrikto de SEF

arangos semajnfinan kurson en Malmö 15-16 de marto 1975. Gvidos la direktoro de la centra oficejo de UEA, d-ro V. Sadler. Informas kaj akceptas aliĝojn: Lisbet Andreasson, Södra Rörum, 242 00 Hörby.



# Novajoj el la klubo vivo

Sub tiu rubriko ni provos informi iomete pri la agado je la klubo vivo. Tial mi petas raportojn de vi. Speciale novaj ideoj pri informado interesas: Bonvolu sendi ilin al mi: **Gunnar Farm, Svarvargatan 9 A, 723 37 Västerås**, aŭ al la sekretario de la klubo en Västerås: **Wim Posthuma, Soldatgatan 40, 723 45 Västerås**. Gis nun ni ricevis nur kelkajn raportojn:

## ESPERANTOKURSOJN

oni havas en sufiĉe multaj lokoj, kelkaj en la kadroj de la diversaj klerigaj asocioj kaj kelkaj aranĝitaj de la kluboj mem.

## LA LERNEJA KAMPANJO

ne fluas tro bone, sed raportoj pri prelegoj en lernejoj venis el ekzemple Söderhamn, Karlstad kaj Stockholm. Ankaŭ en Västerås ni informis en kelkaj lernejoj.

## PROpra EJO EN GÖTEBORG

La urbo Göteborg disponiis la domon de la antaŭa Arbetarinstitutet (Laborista Instituto) al libertempa agado inter eksterlandaj gastlaboristoj. Ankaŭ la esperantistoj de Göteborg ekhavis tie por modesta prezo propran ejon, tute modernan kaj bonan, por ekspedicia laboro kaj por kunvenoj. — Por pli grandaj kunvenoj oni povas disponi la grandan ĉefsalonon de la domo, kaj en dimanĉa posttagmezo en novembro kolektiĝis tie ĉirkaŭ 50 personoj. Wilhelm Anjou prelegis pri la vivo de Maria Stuart kaj Helma Nilsson muzikis. Ĉeestis reprezentanto de la Kultura Komitato de la urbo Göteborg, kaj Erik Johansson esprimis al li la dankon de la esperantistoj de Göteborg pro la bonvolemo, kiun komencis montri al ili kaj ilia agado la estraro en la urbo.

## KURSFINO EN KUNGÄLV

Du studrondoj, unu de Märtha Andreason en Kungälv kaj unu el Stenungssund partoprenis je la fino de la aŭtuna studsezono renkontiĝon en Kungälv 3.12. La redaktoro de La Espero Ake Blomberg alvenis kaj parolis pri la historio de la esperantomovado, speciale pri ĝia unika internacia kulturo.

## BIBLIOTEKOJ

En Västerås ni atingis sufiĉe bonajn rilatojn kun la urba biblioteko kaj la bretspaco por esperantolibroj plivastiĝis.



Ekspozicio en Malmö.

## EKSPOZICIOJ

Kune kun la materialo por la lerneja kampanjo aperis ĉe SEF kelkaj afiŝoj. Ili estis bazo por ekspozicioj en multaj lokoj. Ankaŭ la ekspozicio el Västerås estis montrata en kelkaj lokoj. Ĝi estas prezentata en Göteborg en ĉi tiuj tagoj kaj estos poste je dispono por kluboj kaj aliaj en sudokcidenta Svedujo.

Malmö aranĝis aŭtune ekspozicion en la Urba Biblioteko, kie la bona alvenhalo sur la 1-a etaĝo estis je dispono. La baza materialo venis el Västerås kaj el propra arkivo la klubo aldonis i. a. librojn, kiuj troviĝis sub vitrokupoloj de specialaj tabloj. Tiu ekspozicio vekis grandan atenton ĉe la gazetaro (kun bildoj) kaj ĉe la publiko, kiu faris multajn demandojn.

Stockholm havis dum la tempo 12 aŭgusto ĝis 18 decembro ekspozicion laŭvice en kvin diversaj bibliotekaj filioj en la antaŭurboj kaj en la centro mem. Ĝi konsistis el tri ekranoj kun teksto sub la rubriko "Fakta om esperanto". Ankaŭ kelkaj libroj apartenis al la ekspozicio.

## TURISMAJ BROŝUROJ

Wim Posthuma speciale interesiĝas pri turismaj broŝuroj. Se vi bone raportos al li pri ĉiuj kiujn vi konas, li kolektos ilin en listo, kiun vi eble povus uzi en la agado por broŝuroj en via loko. Alia bona ideo estas, ke vi en via internacia korespondado aldonu adresojn al turismaj oficejoj, kie oni jam havas bonan informilon en esperanto kaj tiel montru ke ekzistas granda intereso pri la afero.

Fine mi petus vian kunlaboron pri raportoj: novaj ideoj pri informado kaj sukcesaj agadoj. Eble diversaj manieroj por interesiĝi gejunulojn estus speciale interesaj.

Gunnar Farm

# VETERANOJ FORPASIS

## JOHN BERGLUND

La 25-an de novembro 1974 forpasis John Berglund, 79-jara, Umeå. Dum multaj jaroj li estis prezidanto de la loka klubo kaj kun sia edzino partoprenanto de Universalaj Kongresoj.

## Inĝ. ALBIN MORARIU

— frato de nia kunredaktoro Tiberio kaj literatura kunlaborantino Eugenia — mortis 69 j. en Cluj, Rumanio. Li edukis generaciojn da sportistoj en sia lando. La Rumana Nacia Konsilantaro por Fizika Eduko kaj Sporto eldonis lian biografion en 1968 sub la titolo "50 jaroj da sporto kun Albin Morariu" kaj distingis lin per ora medalo kaj diplomo "Majstro de la Sporto". La Transilvania gazetaro nekrologe admonis la rumanan junularon transpreni la olimpan torĉon de A. M. kaj ne lasi estingiĝi lian klaskan flamon.

Nian sinceran kondolencon al Familio Morariu!

## ELSA JOHANSSON,

Malmö, sekr. de Klubo Esperantista de Malmö, forlasis nin la 3-an de januaro. Malgraŭ multjara malsano ŝi vigle kaj energie partoprenis la E-laboron. Ŝi postlasis multajn geomikojn ne nur en Malmö kaj Borås, kie ŝi loĝis antaŭe, sed ankaŭ en pluraj svedaj kaj eksterlandaj lokoj. Ŝi ripozu en paco.



60a Universala  
Kongreso  
de Esperanto  
Kopenhago  
26.7 - 2.8 '75



Nu galler det att ordna kongressavgiften **omgående**.

Avgifterna är lägre för den som är direkt medlem i UEA och för den som anmäler sig tidigt. Här nedan följer dessa avgifter enl. de olika kategorierna. Den första avgiften gäller den som anmäler sig senast den 31 mars (inom parentes meddelas avgiften intill den 20 juni 1975 varefter den stiger ytterligare).

Svensk förmedlare (peranto) är Svenska Esperantoförbundet. Anmälningsblanketter kan du beställa hos **fru Ester André**n, Regementsgatan 27 D, 217 53 Malmö (tel. 040-652 09). Till samma adress återsänder du anmälningsblanketten. Även utfärder och logi beställs via fru André, när det sedan blir tid för det, men vänta då alltid först på SEF:s cirkulär, som kommer till alla anmälda.

1. Kongresano, **ne-membro** individua de UEA: **227:—** (252:—)
2. Kongresano, individua membro de UEA kun Jarlibro (MJ): **193:—** (218:—)
3. Kongresano, individua membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo "Esperanto" (MA): **159:—** (184:—)
4. Edz(in)o de Kongresano en kategorio (1): **159:—** (177:—)
5. Edz(in)o de Kongresano en kategorio (2) aŭ (3): **135:—** (153:—)
6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara **68:—** (76:—)
7. Universitata studento ĝis inkluzive 30-jara: **114:—** (126:—)
8. Blindulo: **91:—** (101:—)

Allt i svenska kronor.

När du anmäler dig, skriv mycket tydligt ditt namn och adress men sätt inte ut några anmälningsavgifter på "aligilo". Det gör SEF. Meddela i stället avgifterna tydligt på postgirotalongen eller helst i ett särskilt brev tillsammans med anmälningsblanketten.

Alla avgifter betalar du till **postgiro 14 74 29-5, Svenska Esperantoförbundet, Specialkonto, Malmö.**

## Ere—parkere



Cio havas finon  
Pli valoras kontenta spirito,  
ol granda profito

Horo matena estas horo bona  
Matena horo estas plena de oro

## Lernu per la eraroj

La frazo: "La malnovan bienon oni uzas nun por alia celo, ĉar **jus** (?) **nun** oni nenion kulturadas tie..." estas **malĝusta**.

Laŭ Plena Ilustrita Vortaro "jus" estas adverbo signifanta "momenton antaŭ nun" aŭ "antaŭ tiam". Do la ĝusta esprimo estas: **ĝuste** (!) **nun** oni kulturadas nenion en la malnova bieno.

T. M.

### NI GRATULAS AL

**Ruben Enocsson**, direktoro de RESO, pli frue kasisto de SEF, 50-jara jam 16/11 1974.

## La Espero

Svenska Esperantotidningen

Organ för Sv. Esperantoförbundet,  
Fack, 122 04 Stockholm-Enskede.  
Hägervägen 31.

Postgirokonto 20 12-3.

Ansvarig utgivare: Bertil Akerberg.

Redaktör: Åke Blomberg, Lidåkersgatan 6 C, 531 00 Lidköping.

Tel. 0510-286 42 (arb. 0510-221 30).

Medlemsavgift för direkt medl. 25 kr, ungdom 10 kr, familjemedlem utan tidning 5 kr.

Prenumerationspris 25 kr.

Förbundets sekretariat är öppet onsdagar kl. 18—20, tel. 08-48 99 76.

Sturetryckeriet AB - Stockholm 1974